
ISSN 1381-2939

# tejo tutmonde

tutmonda esperantista junulara organizo

## En la unua TT de l' nova redaktisto vi intervjue ekkonos la novan TEJO-volontulon




| | | |
|---|---|---|
| **Internacia Seminario en Germanio** | **E@I-seminario en Ĉeĥio** | **Ago-Semajno en Pollando** |

*numero 121 (2007:1); jaro 25*



Saluton!

Jen do mia unua numero kiel nova redaktisto de TEJO Tutmonde. Mi esperas ke vi trovos ĝin interesa kaj varia.

Kompreneble la pretigado de mia unua numero konsumis multe pli da tempo ol la postaj numeroj faros. Mi ja devis lerni multajn novajn aferojn, ĉefe pri la grafika parto de mia tasko. Mi do esperas ke la presita versio aspektas tiel, kiel mi antaŭvidis ĝin. Se io ne aspektas tute bone, mi pardonpetas, kaj promesas plibonigi ĝin en mia dua numero.

Ĉi tiu numero estas aparte plena je raportoj pri seminarioj: Temas pri du neesperantistaj seminarioj, en kiuj partoprenis po unu esperantisto, kaj pri esperantlingva seminario de E@I. Aldone al ĉi tiuj seriozaj seminarioj, ankaŭ estas raporto pri la *Internacia Seminario* okazinta en Germanio, kaj pri ĝia sufiĉe nova "konkuranto", la *Ago-Semajno*.

Kiel vi povas vidi en la enhavtabelo, ĉi tiu numero ne nur plenas je raportoj pri seminarioj ktp, sed havas tre varian enhavon. Aparte menciindas la titolpaĝe anoncita intervjuo kun Kasia, nia nova volontulino.

Agrablan legadon!

Marcos

## Ne forgesu rekotizi!

Jes, jam alvenis la tempo por remembriĝi en TEJO (aŭ re-patroniĝi) por 2007. Bonvolu frue rekotizi por ke via ricevado de *Kontakto* kaj *TEJO Tutmonde* ne estu interrompita. Ne forgesu ke, krom ricevado de la interesaj kaj informplenaj TEJO-revuoj, via membreco rajtigas vin ricevi rabaton je la partoprenkotizo de la IJK (kiu en 2007 okazos en Hanojo, Vjetnamio!)! Memoru, TEJO estas via asocio - helpu ankaŭ vi ke ĝi estu forta kaj aktiva en 2007! Kontaktu la Centran Oficejon, aŭ aliĝu rete ĉe: www.uea.org/alighoj

## Enhavo


Estraraj Bondeziroj 2007 ............................3-4
Manlibro pri Vikipedio ..................................4
Raporto pri la pasinta IS en Germanio ..........5
Impresoj pri Herzberg, la Esperanto-urbo .....6
E@I-seminario ...............................................7
Intervjuo kun la nova TEJO-volontulo .......8-9
Trejnseminario en Benino ..............................9
Seminario pri Eŭropo en Hispanio .........10-13
Raporto pri la pasinta Ago-Semajno en Polio ...................................................14-15
Invito al IJK en Vjetnamio .....................16-17
Rezultoj de poŝta voĉdono de la Komitato...17
Invito al IJS en Hungario .............................18
Kalendaro de Esperanto-aranĝoj ...........18, 20
Kontakt-informoj kaj informoj pri TEJO .....19
Videosesio kun Martin kaj la Talpoj ...........20


**Limdato por 2007:3 – 15-a de majo 2007!**


TEJO Tutmonde *estas dumonata oficiala gazeto de TEJO pri la junulara Esperanto-movado. Ĝin ricevas ĉiuj individuaj membroj kaj patronoj de TEJO. Landaj junularaj Esperanto-organizoj povas ricevi ĝin.*

*Kontribuojn sendu (prefere) rete al* ***tejo-tutmonde@tejo.org*** *(per normala mesaĝo aŭ kiel kunsendita tekst-dosiero), aŭ paperpoŝte al la adreso: TEJO Tutmonde (Marcos CRAMER), p.A. Uljana Tschistjakow, Nürnberger Straße 27a, 04103 Leipzig, Germanio. Fotojn/bildojn sendu kiel JPEG.* ***Viaj kontribuoj estas bonvenegaj kaj necesaj!***

*Redaktisto:* ***Marcos CRAMER*** *(Germanio/Britio). Demandojn pri membrecoj, abonoj, distribuo ktp. sendu al: TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando; rete: oficejo@tejo.org. Presado: SKONPRES, Bydgoszcz, Pollando; rete: skonpres@poczta.onet.pl.* ***La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.***

# Estraraj Bondeziroj por 2007


David-Emil

Salsa,
pasis iomete stranga jaro por TEJO kun kelkaj surprizoj (krom la estraraj ŝanĝoj mi neniam imagis ke mi iĝus prezidanto de TEJO kaj ekhavus blogon - nun mi eĉ unu kaj duonan havas...), sed ĝi almenaŭ bone finiĝis kun du sukcesaj jarfinaj aranĝoj - ASo en Pollando kaj IS en Germanio - kaj kun nova redaktoro por TEJO Tutmonde, Marcos CRAMER, kaj nova TEJO-volontulino, Kasia MARCINIAK. Fakte, krom la problemetoj estis bona jaro kun multaj aktivaĵoj organizita de niaj Landaj kaj Fakaj Asocioj. Aparte menciindas la bonega IJK en Sarajevo. Mi ĝojas pri la abundaj aktivaĵoj, ĉar por TEJO la plej gravaj aktivaĵoj ja okazas en niaj Landaj kaj Fakaj Asocioj - sen niaj asocioj, TEJO estus nenio. Nome de la estraro mi pro tio ŝatus danki ĉiujn niajn aktivulojn pro ilia bone farita laboro.

Skribante pri aktivuloj, kiel vi eble scias, estos elektita nova estraro dum la IJK en Hanojo ĉi-somere. Mi esperas ke kelkaj de vi pripensas kandidatiĝi por TEJO-estrarposteno. Estas ege interesa tasko kaj vi povas sperti kunlabori en internacia teamo. Kompreneble, se vi havas demandojn rilate al la estraraj postenoj, vi povas turni vin al la estraro aŭ/kaj la elekta komisiono (Petro BALÁŽ kaj Irmina SZUSTAK).

Mi deziras al vi bonan legadon kaj esperas baldaŭ revidi iujn de vi ie en Esperantujo!

David-Emil WICKSTRÖM
Prezidanto de TEJO

Antaŭ veno de nova jaro oni kutimas planumi, fari rezoluciojn, promesi al si mem kaj al siaj proksimuloj esti pli laborema, agema, lerni lingvojn, prepariĝi al ekzamenoj, trovi pli interesan laboron ktp. Sed antaŭ ol fari tion ni tamen devas resumi la faritan dum la jaro. Kion ni povas diri pri TEJO en 2006? Elektoj de nova Komitato, supera decidpova instanco de nia organizo pasis maje. 20 el 44 Landaj Sekcioj nomumis siajn reprezentantojn, 2 el 3 Fakaj Sekcioj. Kaj nur 2 aktivuloj kandidatiĝis por la posteno de komitatano B. Demisioj ene de la estraro. Malfondo de la fonduso Freŝa Vento. La membraro de 513 membroj laŭ la datumbazo de UEA konstatas la malkreskon kompare kun 2005, kio bedaŭrindas ankoraŭ pro tio, ke de 2002 ĝis 2005 la kvanto de membroj nur kreskis.

Ĉu nur malbonaj novaĵoj? Certe ne. La retpaĝaro de TEJO funkcias kaj proponas al siaj membroj diversajn servojn kaj aktualan informon. Dank' al fonduso «Partoprenu IJK» al Sarajevo povis veni junaj esperantistoj. Kore ni bonvenigas novajn aktivulojn: redaktoron de TEJO Tutmonde Marcos CRAMER kaj la volontulinon de TEJO Katarzyna MARCINIAK. Du seminarioj pasis en 2006: en Belgio kaj en Slovakio, organizitaj de E@I – Faka Sekcio de TEJO.


Valentina

Restu ĉiuj malfacilaĵoj en pasinta jaro. En nova jaro de reelektoj de la estraro, jaro, kiam post 7 jaroj IJK revenas Azien, mi deziras al vi sukceson, fruktodonan agadon, sanon kaj amon!
Valentina SIDOROVA
Ĝenerala Sekretario de TEJO

Karaj,
Mi esperas ke la nova jaro alportas ĝojon, sukceson kaj bonfarton al vi ĉiuj! Espereble, aperos ankaŭ novaj ideoj, fortoj kaj rezultoj,

same kiel novaj membroj kaj kunlaborantoj. Ekster nia movado ekzistas, kompreneble, multaj kaj interesegaj iniciatoj kaj eblecoj por pliriĉigi nian agadon, sed ne nur tion. Estas grave ke niaj reprezentantoj envolviĝu en ĝenerala junulara socio kaj kontribuu al komuna pli bona estonteco, montrante ke la principoj kaj ideoj de amikeco kaj egaleco, kiujn promocias nia organizo, estas des pli gravaj en nuntempo. Ni certe povas kaj devas partopreni en diversaj neesperantistaj junularaj medioj, kaj tiumaniere transdoni opiniojn de nia komunumo al la ekstera mondo. Sed TEJO tion povas fari nur se vi, membroj de TEJO, pretas asisti kaj mem transpreni taskon de reprezentado. Do, se vi scias pri iu aranĝo aŭ projekto kie TEJO devus partopreni aŭ se vi mem volas esti ambasadoroj de nia organizo en la eksteresperanta mondo, ne hezitu kontakti nin per ker@tejo.org.

Ĉion bonan, via Haris SUBAŠIĆ (vicprezidanto de TEJO)

---

# Manlibro pri Vikipedio

En la pasinta eldono de TEJO Tutmonde, Judith Meyer alvokis kontribui al la libera enciklopedio Vikipedio. Ĉar multaj homoj ne vere komprenas kial gravegas tiu ĉi libera enciklopedio (en naciaj lingvoj kaj en Esperanto) kaj ne scius kiel al ĝi ekkunlabori, mi kreis manlibron pri Vikipedio. Temas pri enkonduka broŝuro 32-paĝa. Vidu ankaŭ tejo.org/eo/manlibro-vikipedio




La manlibro estas komune verkita de kelkaj aktivaj "vikipediistoj". Mi presigis 250 ekzemplerojn ĉe la Flandra Esperanto-Ligo en Antverpeno. Interalie dum la novjaraj renkontiĝoj IS kaj AS la manlibro estis senpage disdonita, dum okazis tie prelegoj kaj ekzercado. Pli ol 200 manlibroj jam estas transdonitaj (dankon al Carsten Mischke kaj Chuck Smith pro helpo!).

La presadon financis interalie TEJO (kadre de la fonduso Freŝa Vento) kaj malavara hungara mecenato. Se vi mem interesiĝas pri la broŝuro, kontaktu min. Al ĉiu kiu aĝas malpli ol 30 jaroj, senpage mi sendos ekzempleron (aŭ eĉ pliajn). Plenkreskuloj povas akiri la broŝuron en la retbutiko de la Flandra Esperanto-Ligo (www.retbutiko.net) por 5 eŭroj. La profiton ni uzos por sendokostoj kaj ... por presigi pli da manlibroj!

Korektita reeldono estas do planita. Sendu al mi viajn eventualajn komentojn (lingvajn kaj enhavajn) antaŭ la fino de februaro.

Sur la dua eldono de la DVD-o "Esperanto Elektronike" de E@I troviĝas la manlibro en PDF-formato.

www.vikipedio.org - ek al la verkado! :-)

Nome de la flandra kaj pola Esperanto-junularoj,
Yves Nevelsteen - ĉefredaktoro de la manlibro

# 50-a jubileo de la Internacia Seminario kaj ankoraŭ juna



La kastelo *Wewelsburg* – la ĉi-jara IS-ejo

Dum duona jarcento, junuloj el diversaj landoj kaj kulturoj kuniĝis ĉiujare en Germanio por celebri Silvestron kune. Estus malĝuste festi tiun solenan okazaĵon ie ajn krom en la plej deca loko, kaj la organiza teamo certe ne lasis nin fari tion. La kongresejo trovita estas triflanka kastelo Wewelsburg, ekkonstruita en 1603, kiu situas apud al la urbo Paderborn proksime al la centro de la lando. La kastelo iĝis la sidejo de Heinrich Himmler kaj la SS dum la nazia epoko, sed nun estas uzata la plej granda junulargastejo en Germanio.

La Konstanta Komitato por Renkontiĝoj de GEJ, kiu ŝajne konsistis el amaso da homoj, faris mirinde por kapti bonegan etoson kaj funkciigis ĉion glate. Estis tro da kontribu-antoj pri tro da taskoj por mencii ĉiujn, sed la plej evidentaj devis esti la geonkloj de la IS, Carsten MISCHKE kaj Aneta UBIK, kaj la gufujo, organizita de ACSÁDI Vera estis aparte laŭdata.

Pro nia nekutima ĉirkaŭaĵo, mezepokemaj ideoj kultiviĝis kaj al la Silvestra Manĝo venis pluraj kongresanoj taŭge vestitaj, aliaj kunportantaj vinon, ŝinkon, fromaĝon kaj kolbason por eki la celebradon. La festo laŭtiĝis en la diskejo, kien ĉiuj iris por bonvenigi la novan jaron, kaj la novajn jarojn de aliaj landoj post ĉiu horo. Cetere, bonega vesperprogramo organiziĝis dum la tuta semajno kun tre profesiaj muzikgrupoj, inkluzive de JoMo, Dolchamar kaj novulaj baldaŭ-famiĝontaj repistoj Pafklik. Ankaŭ estis iu teatraĵo, la Fantoma Faŭko, en la stilo de Jerry Springer, amuza eĉ se iom improvizita. Sed la plej pasia programero certe aŭdeblis el la kvaropa kataluna muzikistaro, kiu spontane ekkantis kaj ludis ie ajn kie ili troviĝis, sur koridoro kaj ŝtuparo, kaj kreis bonan etoson ĉe la 1a Internacia Kultura Festivalo.

Por finaranĝi, ĉe la Internacia Vespero dum la lasta nokto la kongresanoj mem faris la programon kaj montris siajn talentojn, kelkaj kontribuantaj kun aktoj komikaj, aliaj muzikaj kaj ankoraŭ aliaj malpli difineblaj. La aro de laboremaj komitatanoj aperis kun aplaŭdo kaj estis feliĉiga pripensado pri la antaŭaj 50 jaroj de tiu historia evento kaj antaŭĝojo pro la venontaj 50.

Daniel WHITE



bon-etosa labambumado dum la IS

# Miaj unuaj impresoj pri Herzberg, la Esperanto-urbo

*Pensoj de nova volontulo* ACSÁDI Veronika *en la Esperanto-Centro Herzberg [hercberk]*




Vojindikilo al la Esperanto-Centro

Mi alvenis al la Centro nokte, sed mi jam povis rimarki, ke temas pri ĉarma urbeto. Dum la sekvaj tagoj mi vidis, ke mi pravis: Herzberg estas malgranda, sed belega; ĝin brakumas montetoj el ĉiuj flankoj, sur unu el ili videblas bela kastelo, la ĉefplaco estas plejparte en sia tradicia formo renovigita, kaj la rivero, kiu trafluas ĝin, en iuj lokoj aperas kiel trankvila, modesta akvofluo, en aliaj kiel sovaĝa akvofalo – kaj ĉie, kien vi iras, vi trovas la vojindikilojn al la Esperanto-Centro!

Herzberg estas kiel Bjalistoko: ankaŭ ĉi tie vivas pluraj nacioj (germanoj, turkoj, grekoj, albanoj, rusoj, vjetnamoj, ktp.), sed ili ne malamas unu la alian, kiel en la naskiĝurbeto de nia Majstro; tamen ili ne kunvivas – en senco, do ili ne kontaktiĝas unu kun la aliaj. Apud niaj ĉefaj aktivaĵoj kiel pluklerigado de Esperanto-instruistoj helpe de trejnseminarioj kaj Tutlandaj Pedagogiaj Tagoj (kies mallongigo, TORPEDO, fakte tre plaĉas al mi), organizado de diversaj semajnfinaj studsesioj pri vere interesaj temoj por pliriĉigi la sciojn de aktivuloj, ni devas iom envolviĝi ankaŭ en la urban vivon por dissemi la ideon de Esperanto. Ni ne volas, ke ĉiuj enloĝantoj perfekte regu esperanton, por ni sufiĉas, se la Kormontanoj* klare konscias, kio estas Esperanto kaj kial ĝi estas grava por ni, ili kaj por la tuta homaro, kaj se ili estas fieraj pri la Esperanto-Urbo.

Pro tio ni devas okazigi diversajn allogajn programerojn, de interkulturaj vesperoj ĝis dusemajna somera feriado, de interkultura karnavalo ĝis konstanta prezentado de la ekzisto kaj funkciado de Esperanto. Por tio ni vere bezonas helpon de la esperantistaro: morala aŭ/kaj mona subteno ĉiam bonvenas ☺, sed krome ni ŝatus, se kiel eble plej multe da esperantistoj pasigus ĉi tie tempon, aŭ partoprenante ion el nia riĉa programoferto (serĉu taŭgan por vi ĉe www.ic-herzberg.de) aŭ uzante la servojn de la Centro: ĝi ja mem taŭgas ekzemple por seminarioj, trejnadoj, estrarkunsidoj por aktivuloj, sed tre proksime troviĝas aliaj eblecoj, de favorprezaj hoteloj ĝis matracaj dormejoj, kie vi povas organizi plurtagan Esperanto-renkontiĝon ĉiusezone. Pripensu tion kaj aliĝu ĉe ni – ni helpas en la surloka organizado!

Por realigi ĉion tion ni estas malmultaj, konsekvence, ni devas labori preskaŭ tage-nokte; do, ĝis, kara Leganto, mi havas multe por fari. ☺

* laŭvorta, ŝerca traduko de la nomo *Herzberg*: *Herz* = koro, *Berg* = monto

Stadt Herzberg am Harz
... die Esperanto-Stadt
... la Esperanto-urbo

Je la 11-a de junio 2006, la urbo konsilantaro de la urbo Herzberg en Germanio decidis aldoni al la urba nomo la aldonaĵon *Esperanto-Stadt* (Esperanto-urbo), tiel ke la urbo nun oficiale nomiĝas *Herzberg – die Esperanto-Stadt / la Esperanto-urbo*. Jam de multaj jaroj la Interkultura Centro Herzberg, kiu servas kiel klerigejo de la Germana Esperanto-Asocio kaj kiel kulturcentro de UEA, troviĝas en la urbo. En la urbo okazas multaj Esperanto-aranĝoj, kaj en ĉiu urba lernejo eblas lerni Esperanton. Legu pri la spertoj de ACSÁDI Veronika en Herzberg en la artikolo maldekstre.

# E@I-seminario en Brno

En Brno, la dua plej granda urbo de Ĉeĥio, okazis inter la 4-a kaj la 10-a de novembro internacia junulara trejnseminario pri "Lingvoj en interreto", organizita kunlabore de E@I (Edukado@Interreto) kaj ĈEJ (Ĉeĥa Esperanto-Junularo). Temis jam pri la oka trejnseminario de E@I, kaj por ĝia okazigo estis utiligita subvencio kiun donis la EU-fondaĵo Junularo. La seminarion partoprenis 23 junaj esperantistoj el 9 landoj (Brazilo, Danio, Germanio, Hungario, Kanado, Litovio, Pollando, Slovakio kaj la gastiganta Ĉeĥio).

La seminario okupiĝis pri "lingva diverseco kaj ties specifaj trajtoj en la reta medio" kaj ĝiaj partoprenintoj estis dividitaj en du grupojn - la komencantoj trejniĝis pri kreado de retpaĝaroj (HTML, JavaScript, CSS, aspektigado), dum la pli spertaj partoprenantoj okupiĝis pri unuopaj problemoj rilataj al kreado de pli ampleksaj multlingvaj retaj projektoj (traduksistemoj, regulaj esprimoj, XSLT, Flash, sekureco de retprojektoj). Kelkaj programeroj estis komunaj, ekz. prelegoj pri la programo Junularo aŭ pri optimumigado de retpaĝaroj por serĉiloj.

Okazis ankaŭ internacia vespero kaj ekskurso al grotoj kaj abismo en la proksima Moravia karsto. La programo kulminis per vizito al komputil-lingvistika laboratorio de la Fakultato de informadiko ĉe la Masaryk-Universitato en Brno, kies dungitoj prezentis la nuntempan staton de esplorado en la kampoj de komputila prilaborado de natura lingvo, inkluzive de morfologia kaj sintaksa analizoj, lingvosintezo kaj lingvorekono. Post la seminario 17 el ĝiaj ĉeestintoj daŭrigis sian ĉeeston en Ĉeĥio per partopreno ĉe la konferenco KAEST (Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko) en Dobřichovice apud Prago, kies ĉeftemo "Lingvo kaj interreto" intence kongruis kun tiu de la seminario.

Marek BLAHUŠ, Ĉeĥio



Grupa foto de la partoprenantoj en la seminario (foto de E@I)

# “Mi multe gajnis en mia vivo dank´ al la lingvo, do eble nun mi povas almenaŭ iomete repagi mian ŝuldon.”

En la antaŭa numero vi jam povis legi pri la nova TEJO-volontulo Kasia MARCINIAK. Nun ŝi respondas la demandojn de la nova TT-redaktoro Marcos CRAMER.


Kasia

***- Saluton Kasia! Rakontu iom pri vi mem!***

- Mi ŝategas ĉokoladon (ŝerco). Jen pli seriozaj respondoj:

• **Nomo:** Kasia Marciniak
• **Loĝloko:**Bydgoszcz
• **Naskiĝtago:**1978-01-04
• **Profesio:** vojaĝgvidanto / ĉiĉerono / libro-tenistino
• **Ŝatokupoj:** Mi ŝatas arton, historion de popolo kaj historion de leĝo (ĉefe de mezepoko) kaj vojaĝojn. Kiel vojaĝgvidanto mi vizitis multe da belaj lokoj. Mi ankaŭ ŝatas lerni fremdajn lingvojn kaj partopreni en Esperanto-aranĝoj. En libera tempo mi desegnas kaj pentras kaj do ĝenerale artumas. Mi ankaŭ kolektas malnovajn monerojn kaj monbiletojn de diversaj landoj.
• **Vivmoto:** "Se ne povas kiel devas, devas kiel devas" (ekzistas nederlanda esprimo kiu sonas: "se ne povas kiel devas, devas kiel povas", por mi devas kiel devas se oni forte volas).

***- Kiel kaj kiam vi esperantistiĝis?***

- Mia aventuro kun Esperanto komencis en bazlernejo. Mi partoprenis kurseton de Esperanto, kiun gvidis S-ino Danuta (Skiba) Kisiel. Ŝia adreso ĝis nun aperas en la libro de Pasporta Servo kiel gastiganto.

Dum la kurso mi ricevis adreson de knabino kiu loĝis en Belgio. Kun ŝi mi ĝis nun havas bonan amikecrilaton kaj foje mi vizitas ŝin. Mia unua letero al ŝi forlasis mian domon junie 1990. Kaj ekde tiu tempo ni ofte korespondas. Nun pli ofte rete, sed ni ankaŭ vidas unu la alian ofte. Ŝi restas mia bona amikino.

***- Vi studis turismikon en Akademio Internacia de la Sciencoj. Kiel funkcias ĉi tiu Esperantlingva studado?***

- De mia flanko ĝi estis sufiĉe interesa. Mia studado ĉefe okazis en Pollando ĉe Internacia Studumo Pri Turismo kaj Kulturo. Tamen ni vojaĝis al aliaj landoj por partopreni studadsesiojn. Por onta vojaĝgvidanto estis bona komenco dum studado vojaĝi. La plej granda malavantaĝo estas ke oni bezonas tempon kaj monon por partopreni studadsesiojn, kiuj okazas ekster de loĝlando. Sed tio ankaŭ igas onin trovi fontojn por tamen povi partopreni la interesajn sesiojn.

Mi multe lernis, kaj ankaŭ ekvidis ke oni povas partopreni prelegon pri sufiĉe malfacila temo kaj kompreni ĝin uzante nur Esperanton. Tio nur montras kiom forta estas la lingvo kaj ke ĝi havas riĉan vortaron. Mi lernis multe da utilaj kaj interesaj aĵoj. Al mi ege plaĉis la tuta aventuro kun AIS, kaj mi atingis la bakalaŭran gradon en turismiko. Mia finekzameno kaj defendo de bakalaŭra disertacio okazis en Slovakio. Mi bone rememorigas la tempon dum kiu mi studis ĉe AIS.

***- Ĉu vi antaŭe aktivis en la Esperanto-movado? Se jes, kiel?***

- Mi estis siatempe estrarano de loka Esperanto-klubo. Nome de ĝi mi kunhelpis organizi MEJK en Bydgoszcz. Krome mi ofte vizitis Esperanto-aranĝojn en Germanio kaj Italio, Belgio kaj Nederlando. Krom tio ne multe.

***- Kial vi decidis volontuli en la Centra Oficejo?***

- Mi alvenis al etapo en mia vivo kiam mi ne plu ŝatis vojaĝi kaj fakte planis eklabori. Sed mi ankaŭ pensis ke bonan sperton mi povos atingi donante mian liberan tempon al dispono de Esperanto. Mi multe gajnis en mia vivo dank´ al la lingvo, do eble nun mi povas almenaŭ iomete repagi mian ŝuldon. Mi do povas ripozi iomete post kelkaj jaroj da vojaĝoj. Kaj samtempe lerni multe da utilaj kaj novaj aĵoj, kio certe estos utila en iu ajn laboro kiun mi poste faros. Mi ankaŭ lernos pli pri la movado ktp. Do se mi nur taŭgos kiel TEJO volontulo, mi volonte daŭrigos la laboron ĝis novembro 07.

***- Kion vi volas fari por TEJO?***

- Sekvi la regulojn de la organizo; funkciigi ilin bone; kontribui al ordigado de TEJO-arkivo; kontribui al disvastigo de informoj pri Esperanto; uzi mian vivsperton dum laboro por la TEJO-oficejo.

***- Kiaj estas viaj ĝisnunaj impresoj pri la TEJO-laboro, la Centra Oficejo ĝenerale, viaj kolegoj, la oficeja etoso kaj la vivo en Roterdamo?***

- Ĉio estas bone. Mi ja lernis alkutimiĝi kaj rapide adaptiĝi al la nova ĉirkaŭaĵo. Mi ofte devis translokiĝi, kaj ĉefe la lokoj estis por mi tute nekonataj. La teamo estas amikeca kaj helpema. Ĉiuj komprenas ke mi devas ankoraŭ multe lerni kaj do helpas sen plendi. Kaj por tio mi ŝatus danki al ili. Roterdamon mi neniam ŝatis kiel urbon. Por mi ĝi estas tro moderna. Sed mi ne venis por admiri, ŝati aŭ malŝati la urbon, sed por labori por esperanto. Do ne multe gravas la loko.

***- Ĉu vi lernas la nederlandan lingvon vivante nun en Nederlando?***

- Mi ja konas la lingvon, do mi nur povas plialtigi la nivelon aŭskultante radion aŭ simple uzante ĝin dum butikumado ktp. Mi iam lernis ĝin en Belgio, kaj atingis la 5-an nivelon (de 5 niveloj eblaj) pri "Nederlanda lingvo kiel fremda lingvo" ĉe la Centro de Vivantaj Lingvoj en Luveno (Leuven), Belgio.

# Trejnseminario de Unicef en Benino


François

Cele favori la infanojn kaj la togolandajn rifuĝantojn en Benino, solvi problemojn per dialogo kaj eviti la miskomprenon inter la homoj, UNICEF (la Infan-Fonduso de la Unuiĝintaj Nacioj) organizis serion de seminarioj en Agamè (Benino) respektive de la 2-a ĝis la 5-a kaj de la 9-a ĝis la 12-a de januaro 2007 sub la temoj "Kulturo de la paco-solviĝo de konflikto" kaj "Prizorgo de traŭmatizitaj personoj". La lingvo uzita dum la seminario estis la franca. Partoprenis ducento da personoj el tri landoj: Benino, Burundio kaj Togolando. La trejnigitaj homoj celos informi kaj spertigi aliajn homojn pri la ne-violento en la lernejoj, poste al la personoj, kiuj agadas en la sama celo. Pro pluraj kialoj, François estis invitita kaj plentempe partoprenis la trejnseminarion. Li ne prelegis sed tamen kaptis la belan okazon por sciigi al la partoprenintoj, ke Esperanto kaj Mondcivitaneco kontribuas al la paca realiĝo. Sekve François negocis kun la loka respondeculo, ke la sama seminario okazos por junaj esperantistoj en Afriko kaj ke UNICEF finance kaj materiale apogus la seminarion pritraktinte la seminario-peton de François. Per ĉi tiu mesaĝo, François alvokas ĉiujn volontulojn, kiuj volas helpi lin, por sukcesigi la kunlaboradon inter UNICEF kaj li (TEJO), kaj por sukcesigi la seminarion en Afriko helpe de UNICEF kiel mecenanto.

François HOUNSOUNOU
TEJO-estrarano pri landa kaj afrika agado kaj ILEI-rilatoj


Partoprenantoj de la trejnseminario

# La pluvo en Hispanio

**En la unuaj tagoj de decembro Marek BLAHUŠ nome de TEJO partoprenis internacian junularan seminarion en Korunjo en Hispanio. La temo de la seminario estis „¿Es ésta la Europa que queremos?“ (*Ĉu tiu ĉi estas la Eŭropo kiun ni deziras?*). Ĝi estis organizita fare de la Konsilio de la Junularo de Hispanio (*Consejo de la Juventud de España*, CJE), kunlabore kun la hispaniaj reprezentoj de la Eŭropa Komisiono kaj la Eŭropa Parlamento kaj kun la loka Junulara Konsilio de Galegio. Ĉeestis ĉirkaŭ 50 gejunuloj el preskaŭ ĉiuj landoj de Eŭropa Unio.**

Mia vojaĝo komenciĝis matene la 30-an de novembro 2006 en la flughaveno de Prago, kaj estis aventura fakte tuj ekde la komenco. La aviadilo de ČSA malfruiĝis ĉe la forveturo je ĉirkaŭ duona horo, sed kun la biletdatumoj




Marek (maldekstre) kun la slovako Michal antaŭ la emblemo de la seminario

perrete ricevitaj lastatage de la hispanaj organizantoj mi efektive sukcesis forflugi. La flughaveno de Madrid-Barajas, kie mi devis ŝanĝi aviadilojn, estas inter la plej grandaj de la mondo, kaj tial ankaŭ tie ĉio iom daŭris. Rezulte, la registriĝmaŝino ne plu enlasis min en mian konektan flugon, kvankam tiu tiam ankoraŭ ne estis forfluginta. Bonŝance jam mia unua flugo estis komuna de ČSA kaj Iberia, kaj tial mi alparolinte stevardinon ĉe la giĉeto sukcesis igi ŝin transloki min en la venontan flugon al Korunjo.

Jam tiuokaze mi havis la unuan oportunon paroli hispane, ĉar la stevardino evidente ne tute bone regis la anglan kaj eĉ foje mem dubeme demandis al mi pri ĝusteco de la tradukoj de iuj vortoj kiujn ŝi angle diris al mi. Kvankam okaze de la seminario mi venis la unuan fojon en Hispanion, la hispanan lingvon mi jam studas dum tri jaroj kaj duono kaj la tento finfine sperti ĝin en ĝia hejma medio estis unu el la plej gravaj kialoj pro kiuj mi decidis partopreni. La tuta aranĝo mem estis oficiale dulingva - hispana kaj angla. En tiuj du lingvoj alvenadis ankaŭ dekomence ĉiuj dokumentoj kaj dum ĉiuj prelegoj kaj diskutoj en pleno estis provizata samtempa interpretado sekvebla per senŝnuraj kap-aŭskultiloj prunteblaj kontraŭ persona identigilo ĉe la enirejo. Tamen, kiel kutime, la diskutoj en grupoj - ofte la plej gravaj - povis okazi nur unulingve. Pro mia emo ekzerciĝi pri la hispana, mi ĉiam strebis aldoniĝi al grupeto hispanlingva, kvankam tiam mi poste eble ne ĉion ĉiam bone komprenis.

Vespere, kiam mi finfine atingis Korunjon, kun kelkaj aliaj malfruaj alvenintoj ni hastis por kapti almenaŭ parton de la oficiala inaŭguro de la seminario, kiun aranĝis la urbestraro en la urbodomo ĉe la ĉefa placo. Post kelkaj, sinsekve interpretataj solenaj paroloj estis por ni pretigita bufedo, dum kiu oni unuafoje povis konatiĝi kun la loka

kuirarto kaj ankaŭ kun la aliaj ĉeestantaj partoprenantoj. Mi ekkonis ekzemple triopon de nederlandanoj, kiuj scivolemis pri la fakto ke mi pere de Esperanto havas amikojn en Nederlando. Fakte, multaj homoj, al kiuj mi prezentiĝis kaj diris ke mi reprezentas TEJO-n, tuj kun sincera admiro reagis mirante ĉu do mi estas tie el inter „la esperantistoj“.

Tiaj reagoj baldaŭ konsciigis al mi, ke ŝajne TEJO havas sufiĉe bonan renomon ene de la Eŭropa Junulara Forumo (EJF) - eble ja parte ankaŭ pro tio, ke malkiel la plejmulto de aliaj EJF-membroasocioj, el kiuj venis la aliaj partoprenantoj, ĝi okupiĝas pri iu specifa temo kaj ne tiom pri junularaj agado aŭ politiko ĝenerale. Okazis krome, ke tute hazarde mia samĉambrano en la hotelo, kie ni loĝis, estis hungaro Akos, inter kies aĵoj en la ĉambro mi tuj post mia enloĝiĝo ankoraŭ dum lia neĉeesto rimarkis vizitkarton de nia vicprezidanto Haris Subašić. Poste mi eksciis, ke ili du estis samĉambranoj dum iu antaŭa EJF-kunsido kaj ke Akos mem kun intereso eksciis tiuokaze de Hara multajn informojn pri



La famega katedralo de Sankta Jakobo en Santiago de Compostela



Kreado de afiŝoj kiuj prezentas la rezultojn de laborgrupoj.

Esperanto. Ankaŭ kelkaj aliaj partoprenantoj de la seminario interesiĝis pri la temo, kaj tial mi profitis mian ĉeeston ankaŭ por iom varbi. Cetere, ankaŭ dum formado de opinioj kaj konsiloj ene de laborgrupoj mi strebis enkonduki kaj diskutigi temojn rilatajn al la agado de TEJO - ekzemple emfazon de justa internacia komunikado, subtenon por lernado de fremdaj lingvoj kaj interkultura klerigado.

La tri tagoj de la efektiva seminaria laboro estis vendredo, sabato kaj dimanĉo. Dum ili oni pridiskutis multajn temojn rilatajn al la junulara socia engaĝiĝo en Eŭropo kaj ankaŭ al la historio kaj estonteco (kaj nuntempo) de Eŭropa Unio ĝenerale (unu el la parolantoj, Marta el CJE, amuzis multajn dirante, ke ni gejunuloj ne estas la estonteco de Eŭropo, sed la nuntempo). Okazis diskutoj kaj laborgrupoj pri temoj kiel civila socio, junularaj politikoj, efiko de la EU-agado en diversaj niveloj de la vivo aŭ transnacia kunlaboro. Ofte revenanta temo dum tiuj diskutoj estis la sorto de la eŭropa konstitucio kaj la sugesto ke ĝia tuja enkonduko signife kontribuus al malapero de multaj problemoj (la ofteco de tiu opinio ŝajne ŝuldiĝis al la multnombra reprezento de la Junaj Eŭropaj Federalistoj inter la partoprenantoj).

Ĉar la seminario estis organizita okaze de la 20-jara jubileo de la eniro de Hispanio en la

EU, ampleksa prelegbloko komence estis dediĉita al tiu temo. El ĉiuj prelegoj ĝuste tiu parto estis por mi unu el la plej interesaj, ĉar oni tie komparis la statojn de Hispanio antaŭ tiuj dudek jaroj kaj nun, kaj klare resumis kaj per ekzemploj ilustris la ŝanĝojn okazintajn dum tiu periodo. Speciale interesa estis la debato pri la antaŭjuĝoj pri Hispanio kaj pri tio ĉu tiuj iel ŝanĝiĝis ekde la EU-membriĝo de la lando. Mi mem kiel unuafoja vizitanto de Hispanio povis kontribui al ĝi, konfirmante la daŭran persiston de la antaŭjuĝo ke Hispanio estas „suno kaj plaĝoj“ (kaj eble ankoraŭ virbovbatalo).

Estis tamen, kvazaŭ la loko por la seminario elektita kaj la vetero kiu regis en ĝi dum nia tuta ĉeesto nepre deziris montri al ni, ke ne estas tiel, kaj eble eĉ konvinki nin pri la malo. La organizantoj diris, ke ili elektis Korunjon (galege kaj nun ankaŭ oficiale hispane „A Coruña“, antaŭe hispane konata kiel „La Coruña“) ĝuste pro la specifeco kultura kaj lingva de la aŭtonoma komunumo de Galegio ene de Hispanio, sed mi pli konvinkiĝis ke la tipa surloka vetero estis la kaŭzo. La urbo troviĝas en la ekstrema nordokcidento de Hispanio, apud la Atlantika oceano kaj kun 250.000 enloĝantoj estas unu el la centroj de Galegio. Pro la ĉeoceana klimato tamen la temperaturoj eĉ dum la plej varma somero ne superas 20 celsiajn gradojn. Kaj pluvas preskaŭ ĉiam... Kun kelkaj kunĉeestantoj ni eĉ rimarkis, ke certe la konata anglalingva diraĵo „The rain in Spain falls mainly on the plain“ (*La pluvo en Hispanio falas ĉefe sur la ebenaĵon* - angla prononcekzercilo) devas esti inspirita per A Coruña.

Tamen, la urbo per si mem ja belas, kion mi povis sperti mem, promenante en libera tempo dum la lasta tago kun kelkaj aliaj junuloj en la urbocentro kaj ĉefe laŭ la marbordo. Pluvis, kaj la ondoj estis grandaj kaj sovaĝaj, sed tiumomente tio eble aĉ aldonadis al la medio ĉarmon. En la konstanta foje pli, foje malpli forta pluvado ni kune promenis ĝis la Turo de Herkulo (*Torre de Hércules*), unu el la plej konataj monumentoj de Korunjo, kiu estas lumturo konstruita en la 2-a jarcento kaj funkcianta ĝis hodiaŭ. La plej fora pinto de Hispanio kaj de norda Iberio, la kabo Finisterre („Fino de la tero“), ja malproksimis nur je kelkdek kilometroj. Tiu kabo estas ankaŭ ofta finhaltejo de la pilgrimantoj sur la Vojo de Sankta Jakobo (*Camino de Santiago*), kiu situas sur la listo de monda heredaĵo de Unesko kaj kies ĉefa celo estas Santiago de Compostela. Kadre de ekskurso okazinta sabate verspere ni povis viziti ankaŭ tiun urbon kaj en la famega katedralo viziti la tombon de Sankta Jakobo.

Tiu ekskursa vespero estis finita per granda komuna vespermanĝo en restoracio, kie oni servis al ni la plej delikatajn lokajn manĝaĵojn, inkluzive de multaj specoj de mariskoj. Kvankam ne strikte tia en ĉiutaga vivo, mi aliĝis al la seminario kiel vegetarano kaj fakte eĉ se aliĝinta kiel viandmanĝanto mi ŝajne hezitus manĝi tiujn salikokojn, kiuj aspektis kvazaŭ ankoraŭ tute vivaj (kaj mi aldone eĉ ne sciis, kiel oni manĝas tiujn). Ĉiukaze, ankaŭ la vegetarana manĝaĵo por la tri inter la kvindekopo estis bone prizorgita, kvankam la menuo certe ĉiam estis aparta, ĉar foje mi ricevis iun pikstangeton kun fruktaj pecoj, kvankam la aliaj samtempe ankaŭ manĝis ion senviandan.

Resume tamen la aranĝo postlasis en mi bonajn impresojn. Mem la unua fojo en Hispanio estis tre granda sperto (kaj post la



En la solena vespermanĝo ne mankis ankaŭ tipa loka manĝaĵo - mariskoj

someraj spertoj el la UK en Florenco mi lernis, ke ne nur la itala similas sufiĉe al la hispana, sed ke ankaŭ male la hispanoj similas sufiĉe al la italoj). Aldone, temis por mi post longa tempo denove pri neesperantlingva seminario - tiel, ke ĉu dum spontanea reago, ĉu male dum serĉado de precizega esprimo, en mian cerbon venadis kaj foje eĉ el mia buŝo eliradis vortoj esperantlingvaj, malgraŭ tio ke oni supozis ke mi diru tion angle aŭ hispane.
Mi ankaŭ spertis malsamon al la esperantistaj renkontiĝoj rilate al la partoprenantaro. Laŭ mia opinio en tiom altnivela seminario tro abundis homoj kies ĉefa celo evidente estis nur ĝui senpagan ferieton kaj amuziĝi kun knabinoj. Tiaj ja ankaŭ multas en Esperanto-aranĝoj, sed kutime en aparte organizataj temaj Esperanto-seminarioj mi rimarkas pli altan kvanton de homoj kiuj vere kaj konkrete interesiĝas pri la temo. Krome reaperis ankaŭ la kutima adiaŭa problemo, kiun mi ankoraŭ memoras de miaj antaŭaj neesperantistaj seminarioj, kaj kiu male estas multe pli milda en la kazo de Esperanto-renkontiĝoj: En la fino de la aranĝo ĉiu diris al ĉiu ke ili certe devos ie denove renkontiĝi kaj ke ili restos en kontakto ankaŭ post la seminario. Tamen, ĉar laboro kaj alia agado en la normala vivo poste kutime abundas, tiaj rilatoj apenaŭ vere ekhavas daŭrigon. Male, en la Esperanto-aranĝoj oni kutime rerenkontadas ĉiam pli-malpli la samajn homojn, kio ebligas ekeston de pli firmaj amikecoj.

Tamen, mi ĝojas ke almenaŭ dum tiuj kvar tagoj ankaŭ ĉi tie mi povis kunesti kun kelkaj sufiĉe interesaj homoj - ekzemple la portugalino Diana, kiu parolis multajn lingvojn kaj eklernis la finnan nur ĉar ŝi iom ebria plenigadis la formularon dezirante efektive aliĝi al kurso de la pola; la finnino Linda, kiu reprezentis la organizon de junuloj el la kamparo; la kiprano Giorgos, al kiu mi klarigis pri la fondaĵo Junularo kaj kiel ĝi kapablus subvencii iun projekton kiun li planas organizi; la sloveno Mitja, kiu antaŭ jaro studis erasme ĉe mia universitato en Brno; aŭ unu el la lokaj hispaniaj novuloj, kiu ŝatis kun mi bonkore babili eĉ se li mem apenaŭ regis la anglan, pro kio ni komunikis per la hispana, kiun male malbone regas mi. Revenante el la seminario, mi kun aliaj kvin el ili ankoraŭ pasigis nokton en Madrido (kaj kompreneble ni apenaŭ dormis tiam, ĉar ni preferis iom urbumi) kaj poste jam ekflugis lunde matene je 7:30 aviadile al Prago, por kapti ankoraŭ je la 15-a horo ekzamenon pri matematiko en la informadika fakultato en Brno. Post bonŝanca akordo de ĉiuj cirkonstancoj kaj kun unu necesa tromphelpo per elflughavena taksiado mi sukcesis ĝustamomente atingi la fakultaton kaj gajni la necesajn punktojn tie. Kaj miru - ekstere eĉ ne pluvis...

Marek BLAHUŠ, Ĉeĥio



Dum la promeno ĉe la plaĝo apud Atlantiko

*La aŭtoro de la artikolo dankas al TEJO pro la provizita ebleco partopreni en ĝia nomo la seminarion de CJE en Korunjo, kaj al la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj kaj la volontulo de TEJO pro la helpema perado de la aliĝo al la seminario, kio igis tiun ĉi neforgeseblan sperton ebla.*

*Por sekvi informojn pri venontaj seminarioj al kiuj TEJO estas invitata kiel partnero, ĉiu TEJO-membro povas aboni la retpoŝtan dissendoliston tejo-ker ĉe*

http://groups.yahoo.com/group/tejo-ker/

# Ago-Semajno – novjare en Pollando



*Komuna fotado* dum la AS

**Jam la kvinan fojon sub nomo de Ago-Semajno (AS) okazis junulara novjara aranĝo en Pollando. Partoprenis ĝin rekorda kaj, por esti sincera, eĉ por organizantoj surpriza kvanto da homoj. Entute venis 187 personoj el 24 landoj. Plej multnombre el Ukrainio, Pollando kaj Rusio.**

La aranĝon organizis Esperanto-klubo "Varsovia Vento" kaj Pola Esperanto-Junularo kun granda helpo de la loka esperantistaro. La urbo Nowy Sącz, ĉirkaŭita de montaro Beskidy, troviĝas sude de Pollando, proksime de Slovakio. Partoprenantoj de la AS povis admiri la regionan kulturon dum busaj ekskursoj, laŭ la valo de la rivero Poprad kaj al Stary Sącz. Eblis ekkoni la ĉirkaŭaĵon pere de la ĉevalaj ĉaroj dum akceptado plena de loka manĝaĵo en vilaĝa agrikulturejo, provi tipan por la regiono alkoholan mielon kaj gustumi famajn mineralajn akvojn de la kuracurbo Krynica. Dum unu el la vesperoj okazis prezentado de popola muziko, instruado de lokaj dancoj kaj gustumado de lokaj specialaĵoj. Abunda programo pri la regiono okazis dank' al la patronoj de AS: La vicmarŝalo de Malgrandpolia Vojevodio s-ro Andrzej ROMANEK, la starosto de la distrikto Nowy Sącz s-ro Jan GOLONKA kaj la urbestro de la urbo s-ro Ryszard NOWAK.

Dum la taga programo okazis kelkaj kursoj, interalie pri meditado, ventrodanco, Esperanto, Tokipono kaj la pola lingvo. Ne mankis iom pli distra programo kiel la ukrainaj kantoj, prezentado de Krimeo aŭ prelego pri vegetarismo. Sed ja estas AGO-semajno, do organizitaj estis diversaj prezentadoj, trejnadoj kaj seminarioj. Dum la tuta semajno daŭris seminario por instruistoj "Gvidu la 'flugilojn'", preparita de ILEI kaj E@I. Krome E@I prezentis sian ĝisnunan agadon kaj ideojn por estonteco. Dum trejnado pri projekt-gvidado oni povis ekscii pri mastrumado de diversaj projektoj, ekzemple pri preparado de IJK kaj pri nova Programo Junularo. Alia trejnado temis pri manlibro pri Vikipedio, kiu estis kreita dank' al kunlaboro de FLEJA kaj PEJ helpe de la TEJO-projekto "Freŝa Vento".

Nokte funkciis diskejo, filmejo preparita de Marek BLAHUŠ kaj "Orienta korto", fare de Katarina VOLKOVA, kiu estis kvazaŭ ĉinstila gufujo. En trinkejo (aŭ kie ajn ;) muzikumis inter alie Kim HENRIKSEN de "Hotel Desperado", rusa flutisto Kirill GRUSTNEV francaj gitaristo Tifen



RABINEAU kaj akordionisto Benoit FONTY. Krom ĉi tiu muzika trinkej-koridora etoso oni ludis "Homlupojn" gvidatajn de Irina GONĈAROVA aŭ festis kun ĉiam drinkemaj kaj kantemaj katalunoj. Kio ege plaĉis al ĉiuj estis ĉiam funkcianta bufedo. Al mi ĉiam dum Esperanto-aranĝoj mankis "noktomanĝoj" kaj dum AS la problemo estis solvita.

La plej grava afero dum la tuta semajno estis kompreneble la novjara balo. Gvidis ĝin la plej fama DĴ en Esperantio - Roĝer BORĜES, kiu per tiuj vortoj priskribis la aranĝon: "Estis belega festo, la plej varma novjara festo iam ajn en Esperantio!"
Kaj kio post la ĉi-jara, tiom sukcesa Ago-Semajno? Certe ne ŝanĝiĝos la mojosa* kaj libera karaktero de la aranĝo. Daŭre ĝi estos ne multekosta, por ke ĉiuj havu eblecon partopreni. Certe okazos en meza Eŭropo, ĉar ja proksimas kaj por okcidentuloj kaj por orientuloj. Planoj estas tiaj, ke ekde 2008 AS komencos vojaĝi tra la landoj de la regiono kaj ĉiun duan jaron okazos ekster Pollando. Unue estos Slovakio. Kio poste – Ĉeĥio, Litovio? Ni vidos :)

Malfacilas priskribi ion nepriskribeblan, do mi rekomendas al vi aŭskulti la 13-an radio-elsendon de Varsovia Vento Podkasto. Ĝi jam haveblas ĉe www.viavento.org. Baldaŭ aperos ankaŭ filmoj pri AS, do de tempo al tempo kontrolu la paĝaron www.as.pej.pl. Kaj ĝis la revido dum AS venontjare!

Łukasz ŻEBROWSKI

* **mojosa** – modern-jun-stila, bonega

La novjara festo ĉiam estis grava afero por mi. Bedaŭrinde neniam antaŭe mi havis eblecon bonvenigi novan jaron en iu esperanta aranĝo. Nun, kiam mi scias kiel estas, mi eĉ pli bedaŭras kaj certas ke ĉiu estonta novjara festo estos pasinta en esperanta etoso.

Ago-semajno estis ĉio kion mi atendis kaj eĉ pli. Sep tagoj de senĉesa bona humoro, ridado, amikumado, ekskursoj kaj bonkvalitaj prelegoj. La regiono de suda Pollando estas same belega kaj interesa kiel mi memoras de la Zakopana IJK, kaj dekorita per vintraj, glaciaj ornamaĵoj eĉ pli bela!

AS por mi, kaj certe por multaj aliaj, estis renkontiĝloko kun multaj geamikoj alvenantaj el foraj landoj. Kiel organizantoj promesis jam antaŭe, la etoso estis simple neforgesebla.

Estas nur januaro nun kaj la tuta jaro estas antaŭ ni, sed ni jam bone scias ke la tempo nekredeble rapide pasas, kaj en la momento ni ĉiuj retroviĝos en Pollando, ĝuantaj kaj bonvenantaj ankoraŭ unu novan jaron.

Vildana DELAIĆ, Bosnio kaj Hercegovino
Prezidantino de LKK de 62-a IJK

Mez- kaj orienteŭropeca etosejo kie ĈIO EBLAS! Vere, ĉio, kio fizike eblas, estas ebligita de la organiza teamo, kiu povus diri: "nu, via propono estas iom stranga, neniam oni faras tion en aranĝo, kaj estos plia laboro". Anstataŭe, la respondo estas "Jes, kia bona ideo! Ĉu vi helpus prizorgi tion? Do bone!".
 - Tifen RABINEAU, Francio


Tifen kun Kim kaj Roĝer

# ĜUU JUNAN KAJ FREŜAN IJK-ETOSON EN AZIA LANDO

**Post 7 jaroj, IJK denove estos organizata en Azia lando. La ĉi-jara IJK okazos en La Pedagogia Universitato de Fremdaj Lingvoj de Hanojo, Vjetnamio.**

Vjetnamio situas en Sud-Orienta Azio kaj Hanojo – la ĉefurbo de Vjetnamio – troviĝas en la nordo de la lando. Ĝi estas centro de ekonomio, politiko kaj kulturo. En 1999, Hanojo estis honorigata de UNESCO: *Urbo de paco*. Samkiel aliaj ĉefurboj, Hanojo estas centro de diversaj belaj vidindaĵoj: Lagoj, muzeoj, parkoj, zoologia parko kaj maŭzoleo de la tutmonde konata prezidento Ho Chi Minh. La plej granda internacia flughaveno Noi Bai ankaŭ situas en tiu ĉi urbo, ĉirkaŭ 30 km for de la centro de la urbo. Ĉiu-jare, Hanojo bonvenigas milionojn da eksterlandaj turistoj. Preskaŭ ĉiuj turistoj admiras la antikvan belecon de Hanojo. Turistoj povas facile turismi en kaj ekster la urbo per publikaj veturiloj. De Hanojo, vi povas facile viziti la golfon Ha Long – konata monda heredaĵo, 170 kilometrojn for de Hanojo; dum la IJK ni organizos komunan ekskurson al la golfo Ha Long.

Partoprenu en IJK! Kongresanoj kolektiĝos en nur unu loĝejo – studenta gastejo de la universitato – kiu situas tuj apud la kongresejo, nur je 2-minuta piediro. Tio estos bona okazo por ĉiuj konatiĝi kaj amikiĝi. Krome, kongresanoj havos ŝancon malkovri la landon, viziti belajn vidindaĵojn, gustumi Vjetnamajn bongustajn manĝaĵojn kaj malkovri la ĉiutagan vivon de Vjetnamoj. Kongresanoj ankaŭ povos ĝui la someran etoson de Hanojo. Ĉiu-posttagmeze, kongresanoj povos naĝi en la naĝejo proksima de la kongresejo.

Dum IJK ni ofertos diversajn programojn: diskutajn, distrajn kaj vesperajn programojn. Precipe, kongresanoj havos ŝancon prezenti pri kongresa temo: "PACO, KUNLABORO kaj DISVOLVIĜO"- la nuna tendenco de la mondo.

*Jen estas niaj proponoj por via kontribuo:*

• ***Tema programo***

Ni antaŭvidas 4 aspektojn por la kongresa temo:

- Kion kaj kiel fari por disvastigi uzon de Esperanto kiel komuna lingvo en la mondo
- Rolo de Esperanto dum protektado de la monda paco
- Kion fari por utiligi la lingvon en diversaj aspektoj de la vivo
- Ideoj kaj kunlaboro-proponoj inter organizaĵoj, individuoj esperantistaj

• *Distra programo*

Ni proponos diversnivelajn kursojn de Esperanto, kurseton de vjetnama lingvo, kurson de la regionaj kaj vjetnamaj popoldancoj, internacian tradician dancon, sportumadon (naĝadon), duontagajn ekskursojn en Hanojo, Esperantan filmon, kuirarton kaj lingvofestivalon. Ĉe la lingvo-festivalo, vi havos ŝancon konatiĝi kun ĉirkaŭ 400 studentoj el 8

lingvaj fakoj de tiu ĉi universitato, kiuj ankaŭ lernas Esperanton.

• *Vespera programo*
Ni organizos diskotekojn, TEJO-vesperon, internacian vesperon (koncerto-, kanto- kaj danco-prezentado de diverslandaj kongresanoj), kaj danckonkurson de Esperantistoj. Ni organizos rigardi popolan arto-prezentadon ĉe teatro (sur-akvan pupteatraĵon). Dum nacia vespero, ni invitos artistojn prezenti vjetnamajn popolajn kantojn kaj dancojn; kaj ankaŭ kantoj prezentitaj de Vjetnamaj esperantistoj kaj blindulaj esperantistoj. Aldone, dum la nacia vespero ni intencas lanĉi kampanjon de kora mono-kolekto de la partoprenantoj por helpi vjetnamajn junajn blindulojn kaj malriĉulojn (sub la formo de aŭkcio ktp). La celo de tiu ĉi agado estas subteni nian kongresan temon.

• *Ekskursa programo*
Ni organizos 2 duontagajn ekskursojn por viziti vidindaĵojn de Hanojo (la unua ekskurso al Maŭzoleo de la prezidento Ho Chi Minh + lia muzeo + armea muzeo; la dua ekskurso al etnologia muzeo + templo de literaturo + arta muzeo, ktp) kaj unu komunan tuttagan ekskurson al la golfo Ha Long.

**Venu al Vjetnamio kaj ĝuu la freŝan etoson de la IJK. Ne forgesu kontribui programerojn kaj ideojn por sukcesigi nian festivalon. Bonvenon! Bonvenon!**

PHAM Mai Lan

*Vi povas aliĝi al la IJK (Internacia Junulara Kongreso) pere de la aliĝilo, kiu estis en la antaŭa numero de TEJO Tutmonde, aŭ sur la retpaĝaro de la kongreso:* ***www.tejo.org/ijk***

# Rezultoj de poŝta voĉdono de la Komitato.

Konforme kun decidoj faritaj dum la Jara Komitata Kunsido dum la IJK en Sarajevo kaj laŭ la proceduro priskribita en la Komitata Reglamento 4.1-7, la Komitato poŝte voĉdonis la sekvajn punktojn:

• aprobo de Labora plano de la estraro 2006/2007

• aprobo de Jara raporto de la estraro 2005/2006

La financaj raportoj por 2005 kaj 2006 ne estis ĝustatempe prezentitaj al la Komitato; pro tio voĉdonado pri ili ne okazis.

Ene de la limdato en la CO alvenis 14 voĉdoniloj, laŭ kiuj ni kalkulas la rezulton:

***Labora plano estas aprobita - jes: 14***

***Jara raporto estas aprobita - jes: 12, ne: 1, sindetenas: 1***



# Venu, festu kun ni!

## Invito al la Internacia Junulara Semajno (IJS) en Hungario

En la jaro 2007 IJS jubileas: ĝi fariĝos 20-jara! Bela aĝo, ĉu ne? 20-jaraĝulo estas ankoraŭ juna, plena je energio, entuziasmo kaj ŝercemo.

Tion ĉion vi povos renkonti en la IJS, kadre de malnov-novaj programeroj (t.e. programeroj "ŝtelitaj" de la pasintaj IJS-j), aŭskultado kaj rakontado de memorindaj momentoj el la historio de IJS, verŝajne ridplena rigardado de fotoj el la pasintaj 20 jaroj, ktp. Krome, estos eblo renkonti (kaj honore saluti ☺) nian "Majstron", do la iniciatulon de IJS, eks-organizintojn de IJS, kaj artistojn, kiuj komencis siajn karierojn en iu IJS.

Ĉu vi ankoraŭ ne decidis, ĉu veni aŭ ne veni? Tiam ankoraŭ unu argumento: la naskiĝtaga tortego de IJS estos ĉokoladgusta, kovrota de verda marcipano... ☺

***www.ijs.hu***



Bona etoso dum IJS!

---

**aprilo**

*2-9: 23-a Printempa Semajno Internacia (PSI) en Bonn, Germanio. Precipe por familioj, sed ankaŭ unuopuloj estas bonvenaj. Inf: Jörg Gersonde, Hermann-Wäschke-Str. 31, 06366 Köthen, Germanio. Tel: +49-3496-558517. Fakso: +49-12125-27149641. Rete: esperanto.de/psi/2007*

*5-10: 31-2 Internacia Junulara Festivalo (IJF) en Lignano Sabbiadoro (UD), Italio. Temo: "120 jaroj de Esperanto: 120 jaroj da interkompreniĝo kaj paco". Rete: iej.esperanto.it/ijf/2007*

*7-14: 2-a Festa Renkontiĝo Internacia de Geknaboj (FRInGoj) en Grezijono (Maine-et-Loire), Francio. Por 7-ĝis-18-jaraĝuloj, iliaj gepatroj kaj kurs-gvidantoj. Inf: Elizabet' Barbay, 25 allée Gabriel Fauré, 93140 BONDY, Francio. Tel: +33(0)14847 2387. Rete: gresillon.org/eventoj/fringoj*

**majo**

*16-20: Primitiva Renkontiĝo 2007 en Den Dolder, Nederlando. (Junulara aranĝo en domo sen fiksa elektro kaj sen fluanta akvo).*
*Rete: www.esperanto-jongeren.nl/pr2007*

*19-21: 5-a Mez-Kanada Renkontiĝo (MEKARO) en Montrealo, Kanado. Inf: informo@esperanto.qc.ca*

**junio**

*1-3: 6-a Semajnfino por Esperanto kaj Biciklado (SEBO) en Montrealo (Kanado) dum bicikla festivalo. Inf: informo@esperanto.qc.ca*

*12-20: 29-a Ĉebalta Esperantista Printempo en Mielno, Polio. Inf: Pola Esperanto-Asocio, BOX 30, 75-016 Koszalin-1 Pollando. Tel: +48-503- 417-825.*
*Rete: esperanto.koszalin.pl/28cebalta.html*

## Ĝeneralaj informoj pri TEJO

*TEJO* estas mallongigo de *Tutmonda Esperantista Junulara Organizo*. Ĝi estas la junulara sekcio de *UEA*, la *Universala Esperanto-Asocio*.

TEJO popularigas internacian kompreniĝon per renkontiĝoj, edukaj programoj kaj uzo de internacia lingvo, Esperanto.

La organizo defendas kulturan riĉecon de lingva diverseco, homajn rajtojn de lingvaj minoritatoj kaj tutmondan kompreniĝon per facila aliro al internaciaj kontaktoj. Uzo de Esperanto estas kadro de niaj klopodoj.

Retadreso: www.tejo.org

## Centra Oficejo de UEA/TEJO

Nieuwe Binnenweg 176
NL-3015 BJ Rotterdam
Nederlando

Tel.: (010) 436 1044
Faksilo: (010) 436 1751,
Retadreso: uea@inter.nl.net

## Estraro de TEJO

• Chuck SMITH (Informado, UEA-Rilatoj)
Leiblstr. 31, DE-74081 Heilbronn, Germanio
Retadreso: chuck@tejo.org

• David-Emil WICKSTRÖM (Prezidanto, IJK)
Fuglegårdsvænget 57, 1tv, 2820 Gentofte, Danio
Retadreso: dew@tejo.org

• François HOUNSOUNOU (Landa kaj Afrika Agado, ILEI-Rilatoj)
B.P. 226, BJ- Lokossa, Mono, Benino
Retadreso: frank@tejo.org

• Haris SUBAŠIĆ (Eksteraj Rilatoj, Vicprezidanto)
Zagrebačka 80, BA-88000 Mostar, Bosnio-Hercegovino
Retadreso: hara@ikso.net

• Katja IGNATIEVA (Kasistino)
c/o Magnini via Don Minzoni 38, IT-20091 Bresso (Mi), ITALIO
Retadreso: katja@tejo.org

• Valentina SIDOROVA (Ĝenerala Sekretario)
3, rue des Nereides, 78180, Montigny-Btx, Francio
Retadreso: valentina@tejo.org

## Membroservoj de TEJO

Kiel membro de TEJO vi ricevas:

• la gazeton TEJO Tutmonde
• la revuon Kontakto
• rabaton por la Internacia Junulara Kongreso kaj la Internacia Seminario
• eblecon partopreni en seminarioj
• eblecon havi blogon ĉe tejo.org
• eblecon envolviĝi en interesa kaj internacia agado

Kaj tre grave: vi helpas al la junulara movado de Esperanto!

Se vi aĝas pli ol 30 jarojn kaj volas ĝui la samajn avantaĝojn (kaj revuojn) kiel membroj de TEJO, kaj aldone subteni TEJO-n, vi estas bonvenigata fariĝi Patrono de TEJO. (Pliaj informoj sur www.tejo.org/patrono aŭ de la Centra Oficejo).

## Agado de TEJO

La agado de TEJO konsistas precipe el:

• informado en junularaj medioj pri la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj pri ĝia solvo per Esperanto
• praktika utiligo de Esperanto je la servo de la junularo kaj informado pri tio en junularaj medioj
• okazigo de kongresoj, konferencoj, seminarioj kaj aliaj kunvenoj
• instigado al la membroj de TEJO aktive partopreni en la esperanta movado.
• Aktivula Trejnado (pli da informoj ĉe www.tejo.org/aktivula_trejnado)

## Subtenu la agadon de TEJO

Ekzistas multe da eblecoj helpi TEJO-n en sia agado. La plej gravaj estas membriĝi aŭ patroniĝi. Sed vi ankaŭ povas helpi al konkretaj agaderoj de TEJO. Mondonacojn al ĝenerala agado de TEJO bv. pagi al la UEA-konto "tejtej" (indiku celon de donaco, ekz: "donaco por KER" aŭ "donaco por landa agado"). Ankaŭ eblas donaci tiel por specifaj celoj:

• Fonduso "Partoprenu IJK-n" - TEJO per ĝi subvencias la partoprenon de TEJO-aktivuloj al IJK
• Pasporta Servo - eble la plej fama eldonaĵo de TEJO

Por pliaj detaloj pri pagmaniero, bv. rigardi ĉe www.uea.org/alighoj/pag_manieroj.html aŭ demandi ĉe la Centra Oficejo.

TEJO dankegas vin pro via subteno!

### julio

*9-27: Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK) en la Universitato de Kalifornio ĉe San Diego, Usono. Inf: M. Eddy, 11736 Scott Creek Drive SW, Olympia WA 98512 Usono, Tel: +1-360-754-4563. Rete: www.esperanto.org/nask*

*15-22: Renkontiĝo de Amikoj-5 (RA-5) en la bazejo "Bolŝie Koti" apud Irkutsko, Rusio.*
*Rete: www.ra.nsk.ru*

*19-25: 20-a Internacia Junulara Semajno (IJS) en Hungario. Inf: HEJ, 1675 Budapest, Pf. 87, Hungario. Rete: www.ijs.hu*

*21-26: 4-a Balta Esperanto-Forumo en Kaliningrad, Rusio. Inf: 236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Rusio Rete: www.esperanto.org/Ondo/Bef/Bef4.htm*

*22 julio – 4 aŭgusto: Renkontiĝo de Esperanto-Familioj (REF) en la feriejo Tiszafüredi Ifjúsági Tábor,vilaĝo Nagyvisnyó, Hungario. Inf: Julianna Vas-Szegedi, Kismuhi u.5. 3/12, 5350 Tiszafüred, Hungario. Tel: +36-70-450-1688.*
*Rete: familioj.komputilo.org/REF/2007*

*25 julio – 5 aŭgusto: 16-a Memzorga Lagumado (MELA) ĉe la vilaĝo Délegyháza, 34 km sude de Budapest, Hungario. Neorganizita kunestado ĉe tendumejo apud naĝ-lago.*
*Rete: www.krokodilo.de/mela/mela.php*

*27 julio – 1 aŭgusto: Arta Lumo en Kuopio, Finnlando. Kultura festivalo kun bonaj muzikistoj, verkistoj kaj aliaj artistoj.*
*Inf: EAF/Arta Lumo, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, Finnlando.*
*Rete: esperanto.fi/ArtaLumo/ArtaLumo_esperanto.htm*

***27 julio – 3 aŭgusto: 63-a Internacia Junulara Kongreso en Hanojo, Vjetnamio. Temo: Paco, kunlaboro kaj disvolviĝo. Rete: www.tejo.org/ijk***

*28 julio – 4 aŭgusto: 7-a Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio en Maribor, Slovenio. Temo: Akvo difinas eŭropan estonton de la 21a jarcento. Paralele al ĉi tiu kongreso okazas Infana Kongreseto. Rete: esperanto-maribor.si*

### aŭgusto - decembro

***4-11 aŭgusto :92-a Universala Kongreso (UK) en Jokohamo, Japanio. Temo: "Okcidento en Oriento: akcepto kaj rezisto." Inf: Centra Oficejo (vidu paĝon 19). Rete: www.k4.dion.ne.jp/~uk2007***

*4-11 aŭgusto: 38-a Internacia Infana Kongreseto (IIK) en Jacugatake, Japanio. Inf: Bert SCHUMANN, 9 rue du Couradin, 35510 Cesson-Sévigné, Francujo. Rete: bertosch.free.fr/iik2007*

*18-25 aŭgusto: Rusiaj Esperanto-Tagoj 2007 (RET-07) en Primorsko-Aĥtarsk, Rusio. Temo: "Vi ne solas". Antaŭa Esperanto-kursaro: 15-a ĝis 18-a de aŭgusto. Inf: Eduard Kolosov: ul. Tankistov 6 – 40, 400094 Volgograd, Rusio. Tel: +7-8442-950423. Rete: www.stelaro.ru*

*20-27 aŭgusto: FESTO 2007 en Montoire-sur-le-Loir, Francio. Inf: Espéranto-Jeunes (Jefo), 4bis, rue de la Cerisaie, 75004 PARIS, Francio.*
*Rete: esperanto-jeunes.org/festo2007/*

*21-23 septembro: Artaj Konfrontoj en Esperanto (ARKONES) en Poznań, Polio.*
*Rete: www.arkones.org*

*5-7 oktobro: 7-a Kafoklaĉo Kaj Ludoj dum Renkontiĝo Semajnfina (KoKoLoRES) en Herne, Germanio. Inf: Petra Dückershoff, Auf der Panne 74 a, 44805 Bochum, Germanio. Tel (hejme): +49-234-380740. Rete: esperanto.de/kokolores*

*27 decembro – 3 januaro: 51-a Internacia Seminario (IS) en Würzburg, Germanio. Junulara aranĝo kun kvalita programo. Rete: esperanto.de/is*

**Plena kalendaro de Esperanto-eventoj: www.eventoj.hu/kalendar.htm**

## Videosesio kun Martin kaj la Talpoj

Nia Faka Sekcio *Eurokka* registris videeton okaze de la preparado de la disko "Pli ol nenio" de Martin & la Talpoj. La videeto alireblas ĉe artista.ikso.net/eurokka/membro/index.php.

Por vidi la videeton necesas esti membro de Eurokka (senpage). "Pli ol nenio" estas la unua solodisko de Martin Wiese de Persone kaj aperos la 15an de februaro ĉe Vinilkosmo.